


# La Amo de Li Xiangnian

Yang Xianhui

2009 Ĉinio

# La Amo de Li Xiangnian

## 李祥年的爱情故事

Verkis Yang Xianhui

Esperantigis Guozhu

作者 杨显惠

世译 胡国柱

☆

2009 Ĉinio

## Antaŭskribo de la Tradukinto

En la mondo multaj aferoj rezultiĝis dank' al hazarda renkontiĝo. En la epoko de interreto tia hazarda renkontiĝo okazas pli facile kaj pli ofte. Ĉiutage mi vagas en interreto, de unu al aliaj retejoj, libere legante en diversaj paĝoj. Ĉiu foje, antaŭ ol mi malfermas mian komputilon, mi ne povas antaŭscii kion mi renkontos ĉifoje rete? Komence de la septembro de 2009, mi legis rete jenan informon:

En aŭgusto, novelaro baze de faktoj verkita de la ĉina verkisto Yang Xianhui, sub la titolo <Virino el Ŝanhajo>（Woman from Shanghai）estas eldonata de Pantheon sub Random House en Usono. Laŭ konciza konigo pri la enhavo far eldonanto, la t.n. <Virino el Ŝanhajo> devas esti la novelaro <Rakontoj de Postvivantoj de Jiabian-ravino> verkita de s-ro Yang.

Jen estas la unuafoja publikigo de la verko de Yang Xianhui en la angla lingvo. La angliginto nomiĝas Huang Wen ( Wen Huang ).

<La Vaŝintona Poŝto (The Washington Post)> kaj <Novjorka Tempo> respektive en la 23a kaj 24a de aŭgusto aperigis recenzojn de Sarah Halzack kaj Howar H French. La recenzo en <Novjorka Tempo> ne nur legiĝas pli longe (ĉ. je 1000 vortoj),

《李祥年的爱情故事》

## 世界语电子书前言

世界上有许多事情都成就于偶然的邂逅。在互联网时代，这种邂逅更容易在网上随时发生。我几乎每天都要上网浏览，而当我每次在开电脑之前，并不知道这一次会遇见什么。2009 年 9 月初，我从网上读到一则短讯：

中国作家杨显惠的纪实小说以《上海女人》（Woman from Shanghai）为名，8 月份由兰登书屋 Random House 旗下的帕特侬 Pantheon 书局在美国出版。从出版方提供的内容简介看，《上海女人》应为杨的小说集《夹边沟记事》。

这是杨显惠的作品首次以英语发行。英译者是黄文（音，Wen Huang）。

《华盛顿邮报 The Washington Post》和《纽约时报》分别于 8 月 23 日和 24 日刊出萨拉・海扎克 Sarah Halzack 和霍华德・弗伦奇 Howar H French 的书评。《纽约时报》的书评不仅篇幅更长__约 1000 词，而且刊登了作者照片，同时在网络版刊出了此书节选。两份头牌大报对《上海女人》的关注，是该书在美国市场获得成功的基本保证。

kaj ankaŭ kun la portreto de la aŭtoro. En reta versio aperis fragmentoj el la libro.

Atento pri la <Virino el Ŝanhajo> donata de la du influhavaj ĵurnaloj garantias la sukceson de la nomita libro en la usona merkato.

Howar H French donas multan admiron pri la verko de s-ro Yang, "bazita sur la personaj travivaĵoj", kaj li opinias ke "la plej kortuŝa peco" el la libro certe estas **<La Amo de Li Xiangnian>**. Li diris ke tiu rakonto pri la revido de la geprotagonistoj post multaj mizeroj estas merita eĉ inter vicoj de la noveloj de Gabriel Garcia Morquez, la laŭreato de la Nobel-premio pri literaturo, 1982.

Ankaŭ s-ino Sarah Halzack kortuŝite de la "senegoisma persistemo" de la protagonistoj en la libro.

Mi sentas honton pro mia preskaŭ analfabeta senscio pri la propraj nomoj (precipe tiuj de neĉinaj fremduloj sed en ĉinaj ideogramoj) en la rezenzo, Do mi traserĉas en interreto, kaj interalie legas jenajn vortojn, ke:

**En la historio de la ĉina literaturo, Yang Xianhui(1946-) estas alia majstro-novelisto post la gloraj nomoj de Lusin(1881-1936), Shen Congwen(1902-1988) kaj Zhang Ailing (1920?-1995), li estas granda ĉina verkisto, pri kiu ni sentas fieron, kaj kiu vere meritas la Nobel-premion de literaturo.**

Mi komencas fari esp-igon kaj eLibron, kiu nun aperas antaŭ vi.

Guozhu 2009-09-29

弗伦奇对杨先生“基于个人史的文学”多有赞赏，并认为书中“最令人动容”的一篇，乃《李祥年的爱情故事》。他说，男女主人公度尽劫波后的重逢，即便放在加西亚·马尔克斯的小说里，亦未尝不可。而海扎克女士在揪心之余，也深深有感于书中人物表现出的“无私与坚韧”。

我感到惭愧的是：我对这一则消息中提到的专有名词（尤其是用汉字书写的外国人名）几乎全都一无所知。于是立即上网查询。读到如下的介绍文字：

杨显惠是中国文学史上继鲁迅、沈从文和张爱玲之后又一位“短篇小说大师”，一位伟大的中国作家，一位值得我们自豪的中国作家，一位真正应获诺贝尔文学奖的中国作家。

于是我动手将《李祥年的爱情故事》翻译成为世界语，以电子书的形式呈现在您的面前。

国柱 2009 年 9 月 29 日

## Li Xiangnian Missorta

Li Xiangnian, ordinara ĉino,
simple pro mistemp' malfavora
tragedie en aĝo flora
falis je grava sortdeklino.

Ĉio bela iĝis ruino,
sekvis persekuto terora.
Li Xiangnian, ordinara ĉino,
simple pro mistemp' malfavora.

Feliĉe, je novela fino,
post longa disiĝo dolora,
rekompencas per amo kora
lin ĉiam fidela virino.

Li Xiangnian, ordinara ĉino.

Guozhu 2009

《李祥年的爱情故事》

## 世界语电子书序诗

李祥年也，平头百姓，
生不逢时，悲惨命运。

毁了一生，美好前程。
李祥年也，平头百姓，

小说结局，堪称万幸：
以身相报，深爱女性。

李祥年也，平头百姓。

国柱
2009

# 1

Lastjare, kiam mi raporteris en Jingyuan-gubernio, Gansu-provinco, mi aŭdis onidiron, ke iu dekstrulo nomata Li Xiangnian vivas en la gubernia ĉefurbo. Li estis lokano de Tianjin, studento de 50-aj jaroj de lasta jarcento, iam laboris en la Sporta Komisiono de magistrato de Lanzhou. En 1957 Li Xiangnian estis etiketita "dekstrulo" kaj sendita kiel detiktulo al la agrikulturejo en Jiabian-ravino por korekto per laboro. Dum la tempo de reeduko per laboro lia kulpo promociiĝis, kaj estis oficiale kondamnita al punlaborado en agrikulturejo por reedukado. Post kiam finiĝis la jaroj de lia punlaborado, li havis postenon en la nomita agrikulturejo. Pli poste, post komplika klopodo li sukcesis fikse loĝi en la ĉefurbo de Jingyuan-gubernio kaj laboris en la Sporta Komisiono de la gubernia registaro.

Aŭdinte tiun nekompletan rakonton, mi tuj vizitis al lia hejmo, tamen, ne sukcesis vidi lin. Sur la pordo de lia hejmo pendas seruro. Najbaroj informis al mi, ke antaŭ pli ol dek jaroj Li Xiangnian jam fondis vendejon de kaligrafaĵoj kaj pentraĵoj en urbo Lanzhou, proksime ĉe la la Stadiono Radiko de la Ruĝa Monto. Nun li kun siaj familianoj plej ofte loĝas tie.

La travivaĵo de Li Xiangnian vekis ĉe mi grandan interesiĝon: Kiel verkisto de Tianjin, finfine mi aŭdis rakonton de iu Tianjin-ano en Jiabian-ravino. Pro kio lia kulpo "promociiĝis" de korekto al punlaboro? La vorton "promocii"

（一）

去年在甘肃省靖远县采访的时候，我就听人说，有个名叫李祥年的夹边沟右派住在县城里。他是天津人，五十年代的大学生，曾在兰州市体委工作，五七年定为右派送夹边沟农场劳动教养。劳教期间，他又升了一级，被正式判刑送劳改农场。劳改期满后留场就业，几经周折落户在靖远县城，在县体委工作。

听到这个残缺不全的故事，我立即去他家拜访，却未能谋面。他家的门上挂着锁。邻居告诉我，十多年前他就在兰州市红山根体育场附近开设了一间字画社，他和家人常年居住在那儿。

李祥年的故事引起了我的极大兴趣：作为天津市的作家，我终于听到了一名天津人在夹边沟的故事；他是怎么由劳教升级为劳改的?

mi aŭdis jam multfoje, tamen ĝis nun mi ankoraŭ vidis neniun "promociiton". Antaŭe Li Xiangnian laboris en la Sporta Komisiono de magistrato de Lanzhou, laŭ rehonoriga politiko al mispunito li rajtas reveni al sia malnova laborposteno en Lanzhou, sed kial li venis al Jingyuan-gubernio en la trosekeca monta regiono sur la norda bordo de la Flava Rivero?

Mi tuj revenis al urbo Lanzhou kaj vizitis al la kvartalo proksime ĉe la la Stadiono Radiko de la Ruĝa Monto serĉi Li Xiangnian, sed ne sukcesis trovi lin.

Sen hazardo estas nenia rakonto. Ĉijare en aŭtuno mi refoje venis al Lanzhou raporteri. Babilante kun amiko pentristo nomata Guan Qixing pri tiu afero. Li parolis al mi: "Ho, Li Xiangnian! Ĉu vi volas viziti al Li Xiangnian? Mi povas gvidi al vi la vojon." Guan Qixing informis al mi, ke li interkonatiĝis kaj amikiĝis kun Li Xiangnian antaŭ pli ol dek jaroj kiam Li Xiangnian okazigis en Lanzhou ekspozicion de siaj kaligrafaĵoj.

Do estas kompreneble kial mi ne sukcesis trovi la vendejon de kaligrafaĵoj kaj pentraĵoj de Li Xiangnian, ĉar la vendejo fakte troviĝas sur strato apud Lanzhou-a Fervoja Buroo, tamen mi nur vane rondiris en kvartalo de la Nova Fervoja Vilaĝo proksime ĉe la Radiko de la Ruĝa Monto. Levinte pordkurtenon el molaj plastslipoj ni eniris la pordon, kaj mia pentristo-amiko alparolas al altstatura homo je ĉ. 70-jara aĝo. Mi tuj konsciis ke tiu estas Li Xiangnian. Jaroj

“升级”这两个字我已经听到多次了，但还没有见到过一个“升级”的人；他原先在兰州市体委工作，落实政策应该回到原单位去，却又怎么到了黄河北岸的干旱山区靖远县?

我立即返回了兰州，并且去红山根体育场附近寻找李祥年，却未能觅到。

无巧不成书，今年秋季又一次来兰州采访，与一位名叫关启兴的画家朋友聊天时谈到这件事，他说，李祥年，你要找李祥年吗?我领你去。关启兴告诉我，十多年前，李祥年在兰州市举办书法展览，他们就认识且熟悉了。

难怪我找不到李祥年的字画店，原来它就在兰州铁路局旁边的街道上，我却在红山根附近铁路新村的地段上转来转去。

掀开软塑料门帘进了门，我的画家朋友就和一位高个子年近七旬的人说话。我立即就意识到他是李祥年。他的白净的脸上岁月留下了抹不去的痕迹，鼻翼两旁的八字纹刀刻斧凿般深刻。

restigis sur lia blanka vizaĝo neforviŝeblajn spurojn. Ambaŭflanke ĉe la nazaloj vidiĝas sulkoj kvazaŭ profunde gravuritaj de grifelo aŭ ĉizilo.

Post iom da komplimentaj salutvortoj, mi tuj diris mian intencon.

Kun nenia rifuzo li respondis volonte: "Ho, vi volas scii kial kaj kiel mi 'promociiĝis' en Jiabian-ravino, kaj poste kiel migris al Jingyuan-gubernio. Tio estas longa historio ne rakontebla per kelkaj vortoj. Lasu min diri malrapide."

* * *

Mi estis sendita al Jiabian-ravino far la Sporta Komisiono de magistrato de Lanzhou en septembro 1958. La vicestro de la oficejo de la Sporta Komisiono kaj la pafad-trejnisto de la Sekcio de la Nacidefenda Sporto persone sendis min tien. Kial per pafad-trejnisto sendi min? Ĉar oni timis ke mi forfuĝus. Post kiam oni proklamis en junio pri la puno al mi sendi min al Jiabian-ravino por korekto per punlaboro, mi jam forkuris unu fojon. Poste mi estis kaptita revenen al Lanzhou kaj resendata al Jiabian-ravino. Ĉifoje, por preventi mian forkuron duonvoje, oni speciale aranĝis ke pafad-trejnisto kun etkalibra fusilo eskortu min.

Ĝenerale dirite, mia vivo en Jiabian-ravino ankoraŭ estas bona. Mi diplomiĝis el la fakultato de fizika kulturo de la Normala Universitato de Hebei-provinco. Mi havas fortan korpon kaj facilmovan lerton. Ekde mia infanaĝo, sekvante mian patron mi vizitadis teatron, mi konas pekinan operon, scipovante kanti kaj ludi.

略事寒暄之后我就说明了来意。他毫不推辞，爽快地说：“你要问我在夹边沟为什么‘升级’、怎么升的级、最后怎么又流落到了靖远县的，这可是一言难尽呀，我得慢慢道来。”

我是 1958 年 9 月被兰州体委送到夹边沟去的。是体委办公室副主任和国防体育科的射击教练送我去的。为什么叫个射击教练送我?怕我逃跑呀——6 月份就宣布我去夹边沟劳动教养，我已经跑过一回了，我是被抓回兰州来之后送夹边沟的。这次送夹边沟，怕我逃跑，专门派了个射击教练提个小口径步枪押着。

我在夹边沟的境遇还算是好的。我是河北师范大学体育系毕业生，体魄好，身手灵活；我从小就跟着父亲进戏院子，懂京剧，能唱能表演。

Veninte al Jiabian-ravino, mi laboris sur kamparo nur kelkajn tagojn kaj jam estis laŭordone aniĝi al teatra trupo por provludi programerojn kaj teatraĵojn por celebri la dekjaran jubileon de la Nacia Tago. Mi ankaŭ lertas en pentrado kaj belskribado.Mia avo estis trapasinto de la provinca ekzameno en Qing-dinastio(1644-1911). Li fondis privatan lernejon kaj bele skribis. Miaj gepatroj diplomiĝis el la ekonomia fakultato de Nankai-Universitato de Tianjin. Mia patro funkciis kiel ĉefo de la financa sekcio de Kailuan-karbominejo, li ankaŭ scipovis bele skribi. Mia pliaĝa kuzo Li Henian poste fariĝis landfama kaligrafo, prezidanto de la Kaligrafa Asocio de Tianjin......Kreskinte el tia familio de kleruloj, nature mi ankaŭ lertas en pentrado kaj belskribado.

En Nacia tago nia teatra trupo prezentis la kompletan trilogion <Perdo de Jieting, Artifiko de la Malplena Urbo kaj Ekzekuto de Ma Su> de la pekina opero. Mi ludis la ĉefrolon Zhuge Liang. Akiris sensacian sukceson je la unuafoja ludo kaj vekis atento de la gvidantaj oficistoj de la agrikultura punlaborejo. Post fino de la prezentado de la pekina opero mi estis transpostenigita al ofico aperigi nigratabulan gazeton......Mia laboro sur kamparo fakte sumiĝis nur je malmultaj tagoj --- Kelkafoje, kiam la gvidanta oficisto vidis ke mi pretigis unu nigratabulan gazeton per tri labortagoj, li ekkoleris, sciante ke mi ruze laboras en intenca maldiligento, kaj resendis min al la punlaboro sur kamparo. Sed post kelkaj tagoj kiam mi laboris sur kamparo, li refoje vokis min al la ofico aperigi nigratabulan gazeton. Jes, mi ruze maldiligentis; tamen, kiam mi laboras sen ruza maldiligento, mi povas pretigi dek nigratabulajn gazetojn en unu labortago, neniu alia

到了夹边沟，在大田劳动了几天，就被抽出来参加演出队，排练庆祝国庆十周年的节目，演戏。我还能画能写。我的爷爷是清代举人，开家馆，写得一手好字。父亲母亲毕业于天津南开大学经济系，父亲做过开滦煤矿的财务主任，也是写一手好字。我的堂兄李鹤年后来成为全国著名的书法家，天津市书法家协会的主席……出生在这样一个书香门第，我当然也是能写能画。国庆节演出全本京剧《失・空・斩》我饰诸葛亮，一炮打响了，引起管教干部的注意，演出结束后叫我去写黑板报……我在大田里就没有干过几天——有时候，领导看我一块黑板写三天，就发怒，知道我是偷懒耍滑，叫我下大田去劳动。可是下大田没几天，就又把我调出来搞黑板报。我是偷懒耍滑了，可是，不偷懒耍滑的时候我一天能写

kapablas fari tion. Mi plenumis ne nur skribi kaj pentri, sed ankaŭ verki kaj redakti la manuskriptojn, tiel ke la gvidanta oficisto bezonas zorgi nenion.

En Jiabian-ravino estas multe da kompetentuloj: pentristoj, poetoj, profesiaj aktoroj, sed al ili mankas la kapablo de multfakulo kia la mia.

Pro mia multfaka kapablo je skribado, pentrado, prezentado, reĝisorado, pretigo de opera dekoracio, pro tio ke mi ofte laboras kiel taglaboristo de provizoraj taskoj, tial en la unua jaro post mia veno al Jiabian-ravino, mi ne multe suferis, mia sano ne difektiĝis pro trolaciga punlaboro, kaj mi ankaŭ ne suferis tro grandan malsatecon.

Mi ofte publike laŭdas kuiristojn de nia manĝejo en mia nigratabula gazeto --- tio estas tre grava.

Inter la regularo por rekompencoj kaj punoj de nia agrikultura punlaborejo estas tia artikolo: tiu, kiu faris tri grandajn meritojn, estu rekompencata per forigo de la etiketo "dekstrulo" kaj nuligo de la puno korekto per korpa laborado. Se mi laŭdas iun, tiu bone impresos al la gvidantaj oficistoj kaj tio favoros por lia meritofaro kaj forigo de la etiketo "dekstrulo".Tial, se mi havas bonan rilaton kun kuiristoj, mi povus ricevi pli multan donon de manĝaĵoj en nia manĝejo.

Se mi publike laŭdas la kuracan stacion, la kuracistoj donos al mi ateston pri malsan-forpermeso, sekve mi povos ripozi, eviti pezajn korplaborojn kaj prezervi mian fizikan forton.

Post alveno al Jiabian-ravino, en la komenco mi havis tian

十块黑板报，其他人根本就做不到。不光是又写又画，连稿子都是我自编自写，用不着管教干部操心。夹边沟的能人多得很，有画家，有诗人，有专业演员，但他们不如我多面手什么都能干。

由于能写能画能演能导能画布景，经常做零工做杂活，所以我到夹边沟一年的时间里没受太大的苦，身体没有累垮，也没太挨饿。我经常在黑板报上表扬食堂的炊事员——这很重要。农场制定出的奖惩制度里有这样的条文：立三次大功就可以摘帽，可以解除劳动教养。我表扬谁谁就在管教干部心里留下好印象，有利于他立功和摘帽。所以我和炊事员们的关系好，去食堂打饭就打得多。我表扬了卫生所，医生就给我开病假条，我就可以休息，可以躲避重体力劳动，保存体力。初进夹边

penson: La puno daŭros al mi nur unu aŭ iom pli ol jaro, ĉu ne? Ĉar la estroj ja tiel diris, ke mi post monatoj da sinhardo jam povos reveni al kaj relabori sur mia malnova laborposteno. Laŭ mia siatempa situacio, mi vivis ja multe pli bone ol ceteraj dekstruloj. Tial mi decidis elteni la suferon por kelkaj monatoj. Tamen, forpasis unu jaro kaj pluraj monatoj, estas nenia informo pri la forigo de mia dekstrula etiketo kaj liberigo. Mi sentas ke mi ne povas plu elteni: mi eksopiras mian amikinon. La amsopiro pri mia amikino tiel dolore turmentas min, ke mi volontas akcepti nenian laboron kaj sentas la vivon tute sensignifa. Mi volas forkuri. Mi volas viziti al mia amikino, intervidiĝi kun ŝi kaj diri al ŝi pri mia forta amsopiro. Mi ankaŭ volas konfesi al ŝi, ke mi jam fariĝis dekstrulo en punlaborejo. Mi volas demandis al ŝi: ĉu vi ankoraŭ amas min?

Se ŝi respondus jes kun volonteco atendi mian revenon, mi revenu al la punlaborejo daŭrigante la eltenadon.

Se ŝia amo jam ŝanĝiĝis, mi neniam revenu al punlaborejo, preferante ĉie vagadi, migri......

Mia amikino nomiĝis Yu Shumin, siatempe lernas en la Pekina Normala Universitato. Ŝi estis lokano de Shijiazhuang. En 1955 la Normala Universitato de Hebei-provinco ankoraŭ sidis en Tianjin. Printempe okazis instrua praktiko de diplomiĝontaj studentoj. Mi laboras kiel anstataŭanta instruisto en la Dua Mezlernejo de Shijiazhuang, kie mi interkonatiĝis kun ŝi. Siatempe mi aĝas 23-jara, ĝuste ekstravertito en flora juneco. Dum mi laboras en la Dua Mezlernejo, okazis la Sportkonkursoj de Hebei-provinco en la ĉefurbo

沟的时候我也曾有过想法：不就是劳教一年半载吗?领导就是这么说的，锻炼锻炼几个月就回来了，接着工作。

按照我当时的处境，的确还是可以的，比其他右派强多了，所以我就下决心熬下去，熬出这几个月去。

可是熬了一年零几个月，一点儿摘帽释放的音讯也没有，我就觉得熬不下去了：想女朋友了。我对女朋友的思念把我折磨得很苦，什么也不想干了，觉得活着没意思了，就想逃跑了。

想去看一看女朋友，见一面，和她叙一叙思念之情。也想告诉她我已经是右派分子了，正在劳动教养，你还爱我吗?

如果她说还爱我，愿意等着我，我就回来再接着熬。

她要是变心了，我就再也不回来了，我宁愿到处流浪，漂泊……

我的女朋友名叫俞淑敏，那时正在北师大读书。

她是石家庄人。

1955 年春季河北省师范大学——那时校址在天津市——搞毕业实习，我在石家庄第二中学代课认识了她。

那时我 23 岁，风华正茂的时候，又是外向型性格，在二中实习期间正遇上河北省的运动会在石家庄举行，

Shijiazhuang. Mi funkciis kiel juĝisto de korbopilkaj matĉoj, kio ja estas mia fortaĵo, kaj mi sufiĉe paradis miajn kapablojn. Ankaŭ la piedpilka ludo estas mia kompetenteco. Okazis tri matĉoj inter teamoj de nia sporta fakultato kaj tiu de Hebei-provinco. Ankaŭ mi sufiĉe paradis min. Kaj, en la tempo kiam nia praktiko estas finiĝonta, mi rimarkis ke Yu Shumin ekhavis amon pri mi.

Tiujare Yu Shumin lernis en la dua klaso en la supera mezlernejo. Ŝi aĝis ankoraŭ tre juna, nur 17-jara. Sed ŝi estas frumatura knabino. Ne nur korpe --- ŝi jam havas grandan staturon kaj ŝveliĝantan bruston, sed ankaŭ pense. Ŝi ofte rigardis min per ardaj rigardoj. Ni jam trapasis tian aĝon, do vi facile komprenas sen mia klarigo, ke se iu knabino ekhavis amon al vi, ŝiaj rigardoj certe estas tute malsamaj ol tiuj de aliaj homoj. Krome, kelkajn tagojn antaŭ nia foriro de la Dua Mezlernejo de Shijiazhuang, mi havis la taskon skribi dankleteron en la nomo de dekkelkaj studentoj de diversaj fakultatoj, kiuj praktikis en la nomita mezlernejo. Yu Shumin fervore venas alkroĉinte sin ĉirkaŭ mi.Jen ŝi serĉis por mi la preparitan ĉinan inkon, jen serĉis por mi la tuĉpenikon. La teksto de la dankletero estis verkita de studentoj de la ĉina lingvo. Mia tasko estas transskribi tion sur ruĝa ŝjuan-papero. Mia manskribo laŭ ĉina *kaj*-kaligrafio estis elstara. Kiam mi ankoraŭ lernis en la kvina klaso de la elementa lernejo, mia belskribaĵo jam estis honorita per la ĉampioneco en la belskriba konkurso de la lernantoj de elementaj lernejoj de Tianjin.

Kiam mi lernis en la malsupera mezlernejo, okazis ekspozicio

我担任篮球比赛的裁判——那是我的长项——出足了风头。
踢足球也是我的特长，我们体育系的足球队和河北省足球队比赛了三场球，我也出了风头。
结果，就在我们实习结束的时候，我发现俞淑敏看上了我。

俞淑敏那年上高二，年龄还小，也就 17 岁。可那是个早熟的姑娘，不光身体发育早——大个子，胸脯挺饱满——思想也成熟早。她常常用非常热烈的目光看我。

咱们都是过来人，不用我说你们就明白，一个姑娘看上了你，那目光和别人是不一样的。

另外，就在我们离开石家庄第二中学的前几天，我代表在这个学校实习的十几名各系的同学写感谢信，俞淑敏就围着我转，很殷勤。

她一会儿去找墨汁，一会儿又去找毛笔。

感谢信的稿子是中文系写的，我捉笔抄在红虎皮宣纸上。

我的楷书是写得很好的，小学五年级，我的作品就获天津市小学生书法大赛第一名；

初中时天津市搞中学生书画展，

de kaligrafaĵoj kaj pentraĵoj de mezlernejanoj en Tianjin, miaj verkaĵoj, impone en diversaj stiloj de *kaj-, ĝŭan-, ŭej-, ŝing*-kaligrafioj okupis trionon de la ekspoziciejo. La granda horizontala rubando estas manskribita de mi, kun la slogano "Ami patrujon, Ami popolon, Ami laboron, Ami sciencon, Ami publikajn objektojn", ekspozita en la Kultura Domo de Tianjin.

Kiam mi finis la transskribon de la dankletero, kun plena ĝojo Yu Shumin laŭdis apud mi: Instruisto s-ro Li, via belskribo estas vere bonega! Vere bonega!.

Ho, ŝi vere admiras min, ekŝatas min el korprofundo. Nature, ankaŭ mi ekamas ŝin. Jen tre bela knabino. Kvankam ankoraŭ tre juna, tamen vere ĉarma belulino, kiun oni povas vidi unufoje inter mil aŭ dekmil knabinoj! Gracia staturo, ĉarma rozvango, ho vere belega!

Ke mi povas konstati ke mi ekamis ŝin, tio okazis en la lastaj du aŭ tri tagoj antaŭ mia foriro de Shijiazhuang. Ŝi invitis ke mi vizitu ŝian hejmon.

Elirinte de ŝia hejmo, ŝi invitis min ekskursi en parko. Ŝi diris: Instruisto s-ro Li, ni kune vizitu al parko! Kial reveni lernejon tiel frue? Post du tagoj vi jam revenos al Tianjin. Ĉu vi ne devas bone ekskursi en Shijiazhuang?

En parko ŝi diris al mi: Instruisto s-ro Li, nun finiĝis via praktiko en mia urbo. Ĉu vi ankoraŭ memoras min post kiam vi revenis al Tianjin?

我的字画占了整间展厅的三分之一，楷篆魏行洋洋大观，斗大的楷书——爱祖国，爱人民，爱劳动，爱科学，爱护公共财物——大横幅是我写的，在天津市文化馆展出。

感谢信写完，俞淑敏满心欢喜地在旁边说，李老师，你的字写得真好，写得真好!

她真是从心底里钦佩我，看上了我。

当然，我也喜欢上了她。这是个很漂亮的姑娘，她虽然年龄还小，但的确是个美人，千里挑一万里挑一的美人，窈窕的身材，妩媚的脸蛋，真是漂亮极了。

我确切地认识到她爱上了我是在我离开石家庄前的最后两三天，她叫我去她家。

从她家出来，她又叫我去公园。

她说，李老师咱们去公园吧，你急着回学校干什么?过两天你就回天津了，还不在石家庄好好玩玩吗?

在公园里她跟我说，李老师，实习完了，回到天津还能记得我么?

Mi respondis: kiel mi povus forgesi vin? Eble vi rapide forgesos min. Kaj Yu Shumin respondis: Mi ne forgesos vin, nur se vi ne forgesos min.

Reveninte al universitato mi diplomiĝis kaj atendas asignotan laboron. Tiam ŝi petinte forpermeson veturis al Tianjin intervidiĝi kun mi. Ŝi havis patrinflankan onklinon en Tianjin. Ŝi loĝas en hejmo de la onklino, sed ĉiutage veturis al mia universitato, aŭ invitis min kune ekskursi al parko. En ĉifoja intervidiĝo, mi donacis al ŝi mian fotoalbumon kaj kelkajn kaligrafaĵojn. Nelonge post reveno al Shijiazhuang ŝi sendis al mi leteron, kun informo, ke ŝia patro vidis miajn kaligrafaĵoj kaj laŭdis, dirante ke tiu ĉi junulo belskribas vere eminente!

Post kiam mi laboris en urbo Lanzhou, leteroj ĉiam venadis inter ni. Tiam la plej rapida poŝtaĵo estas aera, kaj ni ĉiam sendis per aera poŝto. Sendante aeran poŝtaĵon oni devas glui sur la koverto bluan kromslipon kun presita indiko Aerpoŝtaĵo. En la Printempa Festo de 1956 mi unuafoje havis ŝancon veturi hejmurbon por viziti gepatrojn. Kiam la trajno preterveturas urbon Shijiazhuang, mi vizitis al ŝia hejmo por vidi ŝin. Ŝia patro tiel diris al mi averte: Shumin aĝas ankoraŭ tre juna. Vi devas ame zorgu ŝin, ne kaŭzu ĝenon malhelpe al ŝia lernado.

我说怎能忘了呢，你可能很快就会把我忘了。她说我不会忘记你的，只要你不忘记我。

回到学校后就毕业了，等待分配工作，这时她又请假到天津来看我了。她有个姨妈在天津，她住在姨妈家里，但每天往我们学校跑，或者约我出去逛公园。这次相见，我把自己的相册和几幅字给了她。她回到石家庄不久就寄信来，说她父亲看了我写的字，夸奖我说，这小子这两笔字确是精彩。

我在兰州工作以后，我们之间书信不断。那时候最快的信是航空信，我们都寄航空信。航空信寄出的时候邮票上边要贴一枚蓝色的标签，印有“航空”两个字。1956 年春节第一次回家探亲，路过石家庄我去她家看她，她父亲就对我说这样的话：淑敏年龄还小，你要爱护她，不要耽误她的学习。

## 2

Antaŭe mia hejmo troviĝis en urbo Tianjin.

Poste okazis tio: post sia diplomiĝo el la Tianjin-a Universitato, mia pliaĝa fratino estis sendita labori en la ŝtata ministerio de la konstrua industrio en Pekino, ŝi fondis sian hejmon en Pekino. Ŝia edzo lernis en Sovetio en 1953, kaj poste funkciis kiel la ĉefinĝeniero de la projekta instituto de la nomita ministerio.

Ĉar miaj gepatroj jam emeritiĝis liberaj en hejmo, sekve ili ambaŭ translokiĝis al Pekino. Tial por intervidiĝi kun miaj gepatroj mi vizitis al la hejmo de mia pliaĝa fratino. Ĉifoje mi kunportis ankaŭ amikinon Shumin. Shumin vivis en mia hejmo kelkajn tagojn. Miaj gepatroj tre ŝatas ŝin, laŭdante ke ŝi estas sprita, diligenta kaj kun plaĉa lango. Ŝi intime vokas mian patrinon panjo, kaj vokas mian patron paĉjo, do kondute tute kiel membro de mia familio. Tio tiel ĝojigis mian patrinon ke ŝia buŝo neniam povis fermi pro ĝoja rideto. Veninte al mia hejmo Shumin loĝis kune kun mia fratino en la sama ĉambro. Ŝi havis viglan karakteron, emas kanti, ludis violonon, tial tre plaĉis al mia pliaĝa fratino.

Jen okazis epizodo rakontinda.

La tutlanda konkurso de korbopilko de 1956 okazis en Wuhan. Mi funkciis samtempe kiel trejnisto de la du korbopilkaj teamoj vira kaj virina de Gansu-provinco kaj veturis al Wuhan konkursi. Tiam en Gansu-provinco ankoraŭ ne ekzistis profesiaj pilkoteamoj,

## （二）

我的家原来是在天津，由于姐姐天津大学毕业后分到北京国家建工部，在北京成了家，姐夫是五三年的留苏学生，是建工部设计院的总工程师，我的父母都已赋闲在家，就都搬到北京去了，我回家探亲是到我姐家去。这次我把淑敏也带去了。淑敏在我家住了几天，我父母很喜欢她，说她有眼色，勤快，嘴也甜。她见了我母亲叫娘，对我父亲称爸，俨然是我们家庭的成员了，乐得我母亲合不拢嘴。她在我家和我姐住一间房。她性格活泼，爱唱歌，还拉小提琴。我姐也很喜欢她。

这里有个小插曲应该说一下。1956 年的全国篮球比赛在武汉举行，我身兼甘肃省男篮和女篮两支队伍的教练去武汉打比赛。那时甘肃省没有专业球队，

ĉiuj ludantoj de la korbopilko devenis el diversaj fabrikoj, minejoj aŭ entreprenoj. Sed tiufoje la vira korbopilka teamo de nia provinco en la landa konkurso gajnis la trian lokon, ĝis nun tio restis la plej bona sukceso en la historio de la korbopilka sporto de Gansu-provinco, dum la sekvantaj jardekoj neniam aperis pli supera rekordo. Post nur unu monato da trejnado la teamo partoprenis en la konkurso. Mi faris eminentan komandon en la korbopilkaj matĉoj, tiel sufiĉe paradis miajn kapablojn. Rezulte unu f-ino membrino el la virina korbopilka teamo ekamis min kaj ŝi foj-refoje sugestis per amplenaj agoj al mi.

Post la finalo de ĉampioneco okazis alia matĉo por publika elmontrado. Laŭ komisio de la konkursa komitato mi funkcias kiel la juĝisto de la matĉo inter la teamo de la ministerio de la konstrua industrio kaj la teamo de Fujian-provinco. Tiam tiu f-ino fervore servis al mi per konservi mian vestaĵon kaj alporti trinkaĵon.

Dum la revena veturo al Lanzhou en trajno ŝi ankaŭ ne ĉesis sian asiduan servadon: jen donis al mi teon aŭ akvon, jen senŝeligi pomon por mi. La ceteraj membroj de la teamo ĉiuj rimarkis ŝian enamiĝon je mi. Post reveno al Lanzhou, je ĉiu semajnfino ŝi invitis min al teatro, je ĉiu dimanĉo al parko, ĉiam ŝi pagas por ĉio volonte.

Tiu f-ino estis studentino de Tongji-Universitato de Ŝanhajo. Ŝi diplomiĝis pli frue ol mi je du jaroj. Ŝi laboris kiel teknikistino en la Buroo de la Konstrua Industrio de Gansu-provinco. Ŝia salajro estas pli alta ol mi je unu rango, ĉiumonate enspezis 84 juan-ojn. Ankaŭ ŝia hejmo estis en Pekino. En la novjara tago ŝi veturis al Pekino por viziti siajn gepatrojn. Ĉe ekveturo ŝi demandis al mi, ĉu mi transdonu

都是从各厂矿企业抽来的运动员，可是那次我们的男篮打了个第三名，是迄今为止甘肃省篮球史上最好的成绩，以后的几十年也没超过这个纪录。集训一个月就去打比赛，我在比赛中指挥得当，出了风头，结果女篮的一个运动员竟看上我了，频送秋波。最后的冠亚军决赛之后又搞了个表演赛，建工部队对福建队赛委会叫我当裁判，这时候那位女队员给我拿衣裳端水；返回兰州的火车上，她也是一会儿给我倒茶水，一会儿削苹果给我，其他队员都看出来她爱上我了。回到兰州后她每个周末都约我去看戏，星期天去逛公园，都是她花钱。这个姑娘是上海同济大学的学生，比我早毕业两年，是省建工局的技术员，工资比我还要高一级，月薪 84 元。她元旦回家探亲——她的家也在北京——临走问我带什么东西不?

ion al miaj familianoj pere de ŝi?

Mi aĉetis iom da sekigitaj Hami-melonoj kaj vinberoj, petis ke ŝi transdonu tion al mia hejmo. Hazarde ŝia patro laboras ankaŭ en la ministerio de la konstrua industrio. Post reveno al sia hejmo, ŝi pridemandis informon kaj sendis la sekigitajn fruktojn al mia hejmo kaj tiel intervidiĝis kun miaj familianoj. Antaŭ ol finiĝo de ŝia ferio por viziti familianojn kaj ŝia reveno al Lanzhou, mia patro jam sendis al mi leteron, dirante ke

Ni jam ricevis la sekigitajn fruktojn kiujn f-ino Yang transdonis laŭ via peto. F-ino Yang havas bonan impreson pri vi. Kaj ĉiuj membroj de nia familio jam rimarkas ke ŝi kovas amon al vi. Ŝiaj instruiteco kaj enspezo ambaŭ estas ne malaltaj. Tamen ni ankoraŭ opinias ke Shumin havas pli multajn avantaĝojn. Ni ne esperas ke la juna koro de Shumin suferos baton aŭ vundon. Vi nepre ne faru misagon ami la novan kaj abomeni la malnovan, aŭ zorgi pri ĉi tiu sed neglekti la alian.

Post kelkaj tagoj, ankaŭ mia pli aĝa fratino sendis al mi leteron, skribante:

Frato Xiangnian, mi kaj via bofrato ambaŭ havas la antaŭsenton, ke la geedziĝo de vi kaj Shumin verŝajne ne sukcesos en estonteco. Ĉu vi havas la senton, ke malproksima akvo ne povas kvietigi la soifon nun turmentantan? Shumin finos sian lernadon de la supera mezlernejo nur en la somero ĉijare, ŝi ankoraŭ havos lernadon en universitato. Vi ne povas plu atendi, timante ĉu eble okazus ia ŝanĝo al ŝi en estonteco kaj ruinigos vian geedziĝon? Mi kaj via bofrato ambaŭ havas la saman opinion, ke la f-ino Yang estas pli taŭga ankaŭ pli reala por vi.

我买了点哈密瓜干和葡萄干叫她捎去。碰巧她父亲也在建工部工作，她回去一打听就把这些东西送到我家去了，与我的家人见了面。她回家探亲还没回到兰州，我父亲就来了信，说，你托杨某带的瓜干收到了。杨某对你的评价很好。我们全家人都看出来她对你有好感。她的学历和收入都不低，可是我们认为还是淑敏优点多。我们不希望淑敏小小的心灵受到打击和伤害。你可不要喜新厌旧顾此失彼。过了几天，我姐也来了信，说，祥年，我和你姐夫都有预感，看起来你和淑敏的婚事成不了啦。你是不是觉得远水不解近渴——淑敏到今年夏天才能高中毕业，还要上大学，你等不住，怕她将来有什么变化，把你的婚事耽误了?我和你姐夫的意见，还是杨某对你更合适也更现实。

Fakte, en mia koro mi tre ŝatas Shumin --- Mi taksas knabinon prefere laŭ aspekto: La f-ino havas nur pli altan staturon, blankan haŭton, sed senfaldan palpebron. Ŝi estas grasa knabino, malpli alloga ol Shumin ĉu per staturo aŭ aspekto. Mi subtaks ŝin.

Tamen, mi opinias ke la vortoj de mia pliaĝa fratino vere konvinkas: Shumin ankoraŭ havos lernadon de kvar jaroj en universitato. Ho, kvar jaroj! Tio ne estas kvar tagoj aŭ kvar monatoj! Se ŝia koro ŝanĝiĝos nefidela post kiam ŝi finis la universitatan lernadon, tio ruinigos min!

Kaj mi skribis leteron al Shumin, transinforminte la vortojn de mia pliaĝa fratino. Mia intenco estas diri al ŝi: Mi atendas vin, sed vi nepre ne perfidu min!

Ŝi tre rapide sendis al mi respondan leteron, en kiu ŝi skribis: Mi vere amas vin. Ne dubu pri tio! Se vi ne kredas tion, ĉijare en la vintra ferio mi venos al Lanzhou kunvivi kun vi gee kaj per tio esprimu mian fidelan koron. Eĉ se miaj gepatroj baros al mi, mi ne obeu al ili!

La gea kunloĝo okazis ne en Lanzhou, sed en Pekino. En la Printempa Festo de 1957, mi vojaĝis hejmurbon por viziti miajn familianojn. Unue mi eltrajniĝis en Shijiazhuang por intervidiĝi kun ŝi, poste ni duope venu al mia hejmo. Ni eltrajniĝis en Pekino. Antaŭ ol viziti al mia hejmo ni duope kunloĝis en hotelo de Guangwumen-kvartalo por unu tago. Sed min ne favoras fortuno. Mi havas forpermeson por viziti al hejmo nur je unu semajno. Tamen

其实，我从心眼里是喜欢淑敏的——我以貌取人：那位姓杨的姑娘就是个子高一些，长得白，可长了个单眼皮，是个胖丫头，身材长相都比不上淑敏，我看不上她。不过我觉得姐姐说的话也有道理：淑敏要上四年大学。四年，可不是四天四个月呀，她真要是上完大学变了心，可真就把我闪下了!于是我把姐姐的话写信告诉了淑敏。我的意思是告诉她，我等着你，你可不能变心呀。她很快就复信了，信中说，我是真爱你的，你不要不放心。你要是不放心，我今年寒假就到兰州去和你同居，以表心迹。就是我父母亲拦我，我也不听他们的。

不是在兰州。而是在北京——1957 年的春节，我回家探亲——我先到石家庄看她，然后一起去我家。在北京下了火车，去我家之前，我们在广武门的旅社里同居了一天。只是我运气不好，我回家就一个星期的假期，而那几天她正好来例假。

ĝuste en tiuj tagoj ŝi havas sian menstruon. Tial, kvankam mi kaj ŝi kune loĝis en la sama ĉambro unu nokton, tamen ni ne sukcesis gustumi la malpermesitan frukton.

Kiam mi revenis al Lanzhou post fino de mia ferio por viziti al hejmo, kaj skribis leteron al ŝi, mi komencas uzi novan alvokon al ŝi: mia amata edzino. Reciproke ŝi ankaŭ skribis en sia letero tiel komence: Xiangnian, mia kara edzo!

En leteroj ŝi ankaŭ diris, ke, se ni havos infanon en estonteco, ni elkulturu lin eminenta pentristo aŭ majstro-sportisto.

Mi kaj ŝi ankoraŭ ne geedziĝis, sed ni jam havas senton pli intiman ol geedzoj. Ni korespondas per leteroj, tre ofte esprimas sian senton kaj aspiron pri amo-vivo, projektante belan perspektivon de nia vivo en estonteco. Tamen, komenciĝas la politika batalo kontraŭ dekstruloj kaj ...... mi fariĝis dekstrulo!

Ekde la jarfino de 1957, mi ne plu skribis al ŝi leteron, ĉar tiam oni jam proklamis min dekstrulo. Mi sentis ke mi jam fariĝis malinda por esti ŝia partnero. Mi ne devas daŭrigi la interrilaton de geamatoj kun ŝi. Se mi ankoraŭ skribis leteron al ŝi, se mi ankoraŭ daŭrus mian enamiĝon je ŝi, tio estos malutilo por ŝi.

Mi ja tiel pensis: se mi ne plu skribis leterojn al ŝi, tio povus tranĉe interrompi la amon inter ni.

Sed mi eraris. Veninte al Jiabian-ravino, en la mizera cirkonstanco mia sopiro pri ŝi fariĝis eĉ multe pli forta. En la loĝejo de punlaboruloj, en la frosta sendorma longa nokto, mi ofte

我们虽然在一间房子里住了一夜却未能尝到禁果。这次探亲后回到兰州，再写信的时候，我称呼她爱妻。她呢，也在信中写：祥年，我的夫。她还在信中说，将来我们有了孩子，要把他培养成一名出色的画家，或者是运动健将。我和她还没有成为夫妻，但从感情上却胜似夫妻。我们鱼雁传书，频繁地表达着自己的感情和对于爱情生活的渴望，设计着未来生活的美景。可是，反右斗争开始了……我成了右派！从 1957 年底开始，我就再也没给她写信，因为这时已经宣布我为右派了。我觉得我不配她了，不能再和她恋爱了。再要是给她写信，再恋着她，那我就是在害她。我原以为，不再给她写信了，就可以切断我们的恋情了，可是我错了，到了夹边沟的艰苦环境之后，我对于她的思念竟然愈发强烈了。在劳教分子

rememoris pri ŝiaj ĉarmaj rozvangoj, pri ŝia mola korpo, pri la du Printempaj Festoj, kiam mi revenis mian hejmon en Pekino kaj ŝi ankaŭ loĝas en mia hejmo, antaŭ miaj okuloj reaperis la scenoj ke ŝi ludas violonon akompanante mian kanton aŭ ni ambaŭ kune kantas......

Fine, mia sopiro pri Shumin ŝveliĝas ĝis nedetenebla grado: mi volas eskapi por vidi ŝin. Tiam mi ja volas spiti ĉion. Mi pensas ke mi nepre intervidiĝu kun ŝi unufoje, poste mi volontus min oferi al morto......

Same kiel la aranĝo en la Printempa Festo de 1959, je duona monato antaŭ la Printempa Festo de 1960, la estraro de la punlabora agrikulturejo decidis kolekti el la dekstruloj tiujn kiuj havas ludkapablon, ke ili sin preparu per provludoj por prezentado en la festtagoj. Lastjare, en kunlaboro de kelkaj aktoroj de la provinca teatrotrupo de la pekina opero, de la shaanxi-a opero kaj kelkaj amatoraj aktoroj mi prezentis la kompletan trilogion <Perdo de Jieting, Artifiko de la Malplena Urbo kaj Ekzekuto de Ma Su> de la pekina opero. Ĉijare ni ankoraŭfoje prezentas la samon kompletan trilogion <Perdo de Jieting, Artifiko de la Malplena Urbo kaj Ekzekuto de Ma Su> de la pekina opero.

Pro sufero de longtempa malsato kaj trolacigo, malfortiĝis la kruroj al ĉiuj aktoroj, sekve mankas al ili la fervoro pretigi novan teatraĵon. Por ni la prezentado de teatraĵo celas nur eviti pezan korplaboron kaj akiri aldonan porcion de noktmanĝaĵo. Al mi ankaŭ

的宿舍里，在寒冷难眠的长夜里，我经常想起她妩媚的面孔，想起她柔软的身体，想起两个春节我回北京探亲，她住在我家里，她拉琴我唱歌或者我们俩一起唱歌的情景……

终于，我对淑敏的想念发展到了不能遏止的地步：我想逃跑去看她。那时候我什么都不顾了，心想一定要见她一次，然后叫我去死都行……

同 1959 年的春节一样，1960 年的春节到来之前半个月，农场又把右派当中有表演才能的男女抽出来排练节目，准备节日演出。去年我和省京剧团、秦腔剧团的几个演员以及几个票友演了整场的京剧《失・空・斩》，今年我们还是演《失・空・斩》。由于长期饥饿和劳累，演员们都两腿发软，没有了排新戏的创新精神，演戏只不过是为了逃避劳动，混一顿夜间的加餐。我的腿也发软，发飘，但相比而言比别人强些，因为我参加重体力劳动少，体能的消耗比别人少。

fariĝis senfortaj kaj ŝvebaj la kruroj, tamen, kompare al la ceteraj, mia stato estas iom pli bona, ĉar mi havis malmultajn pezajn korplaborojn, sekve ankaŭ malpli konsumiĝis la korpa forto.

En la tago je unu semajno antaŭ la Printempa Festo, mi forkuris.

Tiun nokton, ni provludis programerojn sub gaslampo. En la nokta 12-a horo prenis la aldonan noktmanĝon kaj disiĝis, ĉiuj revenis al sia loĝejo dormi. Ankaŭ mi kuŝiĝis sur lito, ŝajnigante endormiĝi, sen demeto de mia vesto. Post unu horo da tia pseŭdadormo mi ellitiĝis. Mi enŝovis ledan valizon en mian litkovrilon, remetis la kapkusenon. Sur la kapkuseno mi metis malnovan vatitan ĉapon kiun mi prenis antaŭ du tagojn kiel ĉifonaĵon. Per la litkovrilo mi kovris duonon de la ĉapon, por doni falsan impreson, ke Li Xiangnian ankoraŭ dormas ĉi tie. Se la trupoestro aŭ administra kadro venas fari noktan kontrolon, sen fortiro de la litkovrilo ili ne povas malkovri la veron.

Tiel aranĝite, antaŭ la tagiĝo neniu rimarkos mian forkuron.

Tiam ĉiunokte en la korto estis deĵorantaj patrolanoj por antaŭgardi foreskapon far dekstruloj. En la unua tempo kiam la dekstruloj venis al Jiabian-ravino, neniu pensis pri eskapo. Ĉiuj estis tre piaj al la Partio. Ĉiuj volas reveni sian hejmon laŭ leĝa vojo: forigi la titolon de dekstrulo kaj plenumi la kondamnon tra reeduko de punlaboroj.

Tamen, en la Nacia Tago de 1959 okazis kongreso, kiam ni informiĝis ke tra la tuta punlabora agrikulturejo nur tri punitoj akiris

离着春节还有一个星期，我逃跑了。那天夜里我们点着汽灯排练节目，到 12 点钟吃完加餐，就都散伙了，回宿舍睡觉。我也躺下了，装睡，没脱衣裳。睡了大约一个多小时，我就爬起来了。把一只皮箱塞进被窝里，枕头摆好，枕头上还放了一顶前两天拣来的破棉帽子，用被子遮住一半，造成一种假相：李祥年睡在这里。如果队长或管教干部进来查夜，不拉被子是发现不了的。这样，天亮之前不会有人发现我逃跑了。

那时候夜里院子里有人值班巡逻，防止右派逃跑。右派们初到夹边沟的时候没人逃跑，大都对党很虔诚，都想经过劳动改造摘掉帽子解除教养回家去，争取个好的出路。可是五九年的国庆节开大会的时候，全农场只

la rekompencon forigi la titolon de dekstrulo, nuligi la kondamnon de reeduko per punlaboroj; tamen ili estis devigata labori ĉeloke en Jiabian-ravino kun monata salajro de 24 juan-oj.

Tiel ni ĉiuj ekscias la veron: La tiel nomata korekti penson per reeduko de punlaboroj simple estas mensogo, estas trompo.

Ĉiuj el ni fakte estas kondamnita je dumviva malliberigo, la reeduko de punlaboroj por ni longdaŭros sen tempa limo.

Ĉiuj dronis en malespero. Sekve okazis pli kaj pli multaj vivriskaj forkuroj. Por preventi tian forkuron, estraro de la punlabora agrikulturejo sendis administrajn kadrojn kaj la aktivulojn el la dekstruloj nokte deĵori kaj patroli. Por eviti la deĵorantajn kadrojn kaj la aktivulojn, mi kaŝis la vatitan ĉapon, ladbotelon kaj kelke da sekigitaj manto-oj internen ĉe mia korpo, kun mantelo el blua katuno sur ŝultroj, mi ŝajnigis min viziti al necesejo. Enirinte la necesejon, mi transmuriĝis kaj venis ekstere de la korto de la agrikulturejo.

Mi ne kuraĝis iri sur la ŝoseo, laŭ kiu mi iam venis de urbo Jiuquan al Jiabian-ravino.

Mi ne estas certa, ĉu estas patrolantoj sur la nepre irenda vojo de 5 kilometroj kondukanta al Jiabian-ravino de la Jiuquan-Jinta-a ŝoseo? Por atingi tiun ŝoseon oni devas trapasi du simplajn pontojn super du riveroj, kaj tiu ĉi vojo estas la plej facila, oportuna. Mi iras okcidenten laŭ vojo ekster la korto de la taĉmento de fundamenta konstruado kondukanta al la agrikultureja filio en Xintiandun, preterpasis ŝtalfabrikon konstruitan en 1958 --- tio estas kelkaj unuetaĝaj domoj, jam delonge transformiĝis kadavrejo de kuracejo de la agrikulturejo,

有三个人摘了帽子，解除劳动教养，却还必须在夹边沟就业，一月挣 24 元。于是人们明白了，劳动教养改造思想是一片谎言，是欺骗，所有的人实质上都判了无期徒刑，劳动改造遥遥无期。人们都绝望了，铤而走险逃跑的人随之多了起来。为了预防逃跑，农场每到夜间就派管教干部和右派中的积极分子值班和巡逻。为了避免遇到值班干部和积极分子，我把棉帽子、水壶和几个存下的干馍馍藏在贴身的棉袄里边，外边披了一件蓝棉布大衣，装成上厕所的样子进了厕所，然后从院墙上翻过去落在农场大院的外边。

我没敢走当年从酒泉来夹边沟的公路。我不清楚，从酒(泉)金(塔)公路通向夹边沟的五公里必经大道上会不会有人巡逻；从这条公路走要经过两条河流上的两道便桥，这条路最便捷。我顺着基建队大院外边的通往新添墩分场的大道往西走，经过五八年建的炼钢厂——几间平房，早就改为农场卫生所的太平间了

poste mi direktiĝis suden, tra la interkrutejo de Maojia-monto kaj alvenas la bordo de la Klara Rivero.
Ĉar estis en la plej malvarma vintro, dikaj glacioj kovras sur la surfaco de la rivero. Paŝante sur la glacioj mi transiris la riveron.

Tra vasta kamparo, mi trairis la Nordan Riveron, same kovritan de neĝo kaj glacioj, miaj piedoj surpaŝis la Jiuquan-Jinta-a ŝoseo kiu kondukas rekte al Jiuquan.

Nature, mi ne kuraĝas senskrupule iri laŭ la ŝoseo.
Mi rapidis laŭ la ŝoseo nur kelkajn kilometrojn, por ke mi foriĝu per la plej granda rapideco for de Jiabian-ravino. Poste mi descendis de la ŝoseo kaj iris sur dezerta kampo plena de sovaĝaj plantaĵoj, per paŝoj jen profunda, jen malprofunda.

Kaj mi ankaŭ ne kuraĝas distanci for de la ŝoseo tro malproksime por ne perdi vojon.

Vole-nevole mi devas rapidi sur la dezerta kampo: se la punlaborejo malkovris mian eskapon, la administra kadroj tuj galope persekutos rajdante sur ĉevalo.

Laŭ mia origina plano, mi devas atingi Jiuquan-gubernion antaŭ tagiĝo. Tamen je la 8-a horo kiam aperis aŭroro mi ankoraŭ ne vidis la gubernian urbon. Mi vidis nur ŝoseon el flavaj sabloj. Antaŭ mi libere sterniĝas agroj kiuj aspektas tre nigraj dank' al la kontrasto de la postrestanta neĝo.

Sur la ŝoseo veturas du grandradaj ĉaroj portantaj fojnojn, kaj ankaŭ kamparanoj kiuj kondukas la ĉarojn.

——再往南拐，穿过卯家山口，走到清水河边。由于是三九隆冬，河上结了厚厚的冰，我踩着白冰过了河。穿过一片田野，又走过同样是冰封雪盖的北大河，我的脚就踏上了直通酒泉的酒金公路。

当然我不敢大摇大摆地顺着公路走。我仅仅沿着公路快速地走了几公里，使自己以最快的速度离得夹边沟远一些，然后就下了公路，在长满了芨芨草或碱蓬的荒原上前行，深一脚浅一脚的。我还不能离公路太远，以防迷失道路。我不得不在荒野上赶路：一旦农场发现我逃跑了，管教干部就会骑着马追上来。

我原计划在天亮之前走到酒泉县的，可是八点多了，天已拂晓了却还看不见县城，只有黄沙铺就的公路和残雪映衬下显得黑楚楚的耕地在我面前坦坦荡荡展开。两辆拉麦草的大轱辘车吱吱咕咕地行驶在公路上，还有赶车的农民。

Post ankoraŭ pli du horoj da irado mi eniris la gubernian urbon.

Enirinte la gubernian urbon, mi tuj mendis ĉambron en malgranda hotelo per ŝtelakirita laborkarto de dekstrulo kiu laboras en la rafinejo de petrolo en Lanzhou.

Mi supozas ke la agrikulturejo en Jiabian-ravino jam malkovris mian eskapon. Estraro jam sendas administra kadrojn kaj aktivulojn, kiuj veturas ĉu aŭtobuse aŭ ĉevale al la gubernia urbo aŭ stacidomo por kapti min.

Ili certe havas la supozon ke mi ne kuraĝas viziti hotelon, tial mi nepre spiteme loĝu en hotelo.

又走了两个小时，我才走进县城。

进了城我立即在一个小旅馆里用偷来的一位兰州炼油厂的右派的工作证登记了一间房子。我估计夹边沟农场已经发现我逃跑了，领导派出的管教干部和积极分子们已经坐着汽车或骑着马往县城和火车站来追捕我了。他们估计我不敢进旅馆，我却偏要住在旅馆里。

## 3

Mi kaŝis min en la hotelo dum unu tagnokto. La sekvan matenon, mi rapidis al la fervoja stacidomo de Jiuquan kaj kaŝis min en tera kavo kontraŭ la stacidomo.

Ĉirkaŭ je la 9-a horo aŭ iom malpli frue, pasaĝera trajno veturanta el Hami alvenas la stacion. Mi ne kuraĝis iri al ĝiceto aĉeti bileton. Mi transiris fervojon malsupre de la vagonaro kaj tuj enmiksiĝis en la homamason de pasaĝeroj kiuj svarmas por entrajniĝi, mi facilmove puŝiĝis en vagonon. Ĉar estas tuj antaŭ la Printempa Festo, pasaĝeroj tiel svarmas ke ĉiuj vagonoj estas homplenaj, kie oni

## （三）

在旅馆藏匿了一天一夜，转天清晨，我赶到了酒泉火车站，躲在站台对面的一个土坑里。

大约九点多钟，一列从哈密开来的客车进了站。我没敢去买车票，从车下钻过去之后我立即融进了拥挤着上车的人群里钻进车厢。年关在即，旅客熙熙攘攘，挤得车厢里水泄不通。

malfacile moviĝas. Mi sidas en la interna koridoro meze de vagono, kun kliniĝanta kapo en dormeto. Okazis nenia kontrolo de pasaĝera bileto. Post pli ol 20 horoj mi alvenis urbon Lanzhou.

